
ISSN: 0827-3154 Revuo de Kanada Esperanto-Asocio

2007/1 printempo/somero 2007

Mailed under Canada Post Publications Mail Sales Agreement No. 40046355 for the *Lumo*

# LUMO



W. Desmond (Dez) Hackett (1918 – 2007)

Iniciatinto de la postmilita fondiĝo de KEA

Ĉefdelegito kaj Peranto de UEA por Kanado (1954-1984)

*Lumon* eldonas dufoje en jaro KEA, P.O.Box 2159, Sidney (BC) Kanado V8L 3S6 < www.esperanto.ca/kea/ >

*Lumo* ('light') is published twice yearly by the Canadian Esperanto Association

*Lumo* ('lumière') est la revue semestrielle de l'Association canadienne d'espéranto

## ENHAVO DE LA NUMERO

**Agado kaj membroj de la kanada Esperanto-movado**
Mesaĝo de la Prezidanto de K.E.A. (W.G. du Temple) ... 3
Elektiĝis nova estraro por Kanada Esperanto-Asocio (K. Price) ... 4
Esperanto-agado ĉe la Kebekia Socia Forumo (N. Fleury) ... 5
Forpasis Bryce Waters (B.D. Kaneen) ... 5
Forpasis W. Dez Hackett (K. Price) ... 6
KEA donace ricevos bibliotekon (estraro de KEA) ... 8
MeKaRo 5 en Montrealo (K. Price) ... 8
NOREK 2007 : raportas organizinto (O. du Temple) ... 10
NOREK 2007 : raportas gasto (K. Price) ... 11
La retejo de Esperanto en Kanado havas novan vizaĝon ... 12
**Artikoloj**
Albert Saint-Martin (1865-1947) (M. Nadal) ... 13
Pontoj (R. Williamson) ... 14
Kie vivas Avo Frosto (N. Fleury) ... 15
**Diversaĵoj**
Enigmo: Kiu posedas la zebron? (A. Simon) ... 17
Deziras korespondi ... 17
Demian: La historio de la junaĝo de Emil Sinkler ... 18
**Internaciaj novaĵoj**
Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2007 ... 18
**Babilejo de l' redaktoro** ... 19
**Kalendaro de kanadaj Esperanto-eventoj** ... 20

Eldonkvanto de ĉi tiu numero : 200
Redaktis : Paul Hopkins
Provlegis : Ken Price, Allan Simon, Bob Williamson
Presis kaj distribuis : Normand Fleury (kun helpantoj)

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj. Manke de indiko pri aŭtoro, respondecas la redakcio. Niaj artikoloj kaj informoj povas esti parte aŭ plene republikigitaj por laŭleĝaj uzoj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Ni invitas niajn legantojn sendi siajn taksojn, opiniojn, kaj kritikojn, kio ebligos plibonigon de la revuo. *Lumon* senpage ricevas la membroj de Kanada Esperanto-Asocio, kiel ankaŭ asocioj kun kiuj KEA havas interkonsenton pri interŝanĝo de revuoj.

**SE VI ANKORAŬ NE REALIĜIS AL KEA POR 2008, BV. FARI TION NUN!**
Por (re)aliĝi al Kanada Esperanto-Asocio, sendu ĉekon por $25 al
Kanada Esperanto-Asocio, P.O.Box 2159
Sidney (BC) V8L 3S6



## Mesaĝo de la Prezidanto de K.E.A.

La dejora periodo por la nuna estraro daŭros nur ĝis la fino de la jaro 2007. Pro tio mi deziras bondeziri al la nova estraro du jarojn de memorindaj laboroj por Esperanto. La nomoj de la novaj estraranoj por la periodo de la komenco de 2008 ĝis la fino de 2009 troveblas aliloke en ĉi tiu numero de *Lumo*.

Mian nomon vi ne trovos inter ili. Mi adiaŭas al la estraro sed nek al KEA, nek al Esperanto. Mi pretas respondi kiel fidela konsilanto al la estraro, ĉar mi plurfoje okupis diversajn rolojn por ĝi dum la jaroj, laborinte pri la informofako, kiel redaktoro de *Lumo*, kiel kasisto, kaj kiel prezidanto. Mi vidis multajn ŝanĝojn.

Kiam mi esperantiĝis en 1967 kaj laboris en Ottawa sub la gvido de la tiutempa prezidanto de KEA, Lorcan Oh'Uiginn, la ĉefa oficeja laborilo estis malnova Gestetner kiu havis tian temperamenton ke laŭ Lorcan ĝi funkcias bone nur se oni parolas al ĝi ĝentile en Esperanto. Ĉiu nomo de ĉiu membro oni reliefigis sur metalan platon, por ke estu stampa kliŝo por la kompostaĵo el moveblaj tipoj. Kaj nun, nur pensu pri ĉiaj novaj ekipaĵoj por komunikado, presado; ĉiuj novaj metodoj por informado.

La nova estraro komencos prilabori la kreon, la evoluigon de nova laborplano kiam ili komencos deĵori en januaro. Mi ĝojas ke estas kelkaj novaj kaj pli junaj estraranoj! Mi rekomendas ke vi sendu al ili viajn ideojn, viajn proponojn, kaj viajn respondojn al jenaj demandoj.

Kiujn servojn vi deziras de KEA? Ĉu vi volas ricevi **Lumon** en papera formato aŭ ĉu elektronika formato per la reto sufiĉas? Ĉu vi deziras ricevi novan informilon pri Esperanto ĉu en la angla, ĉu en la franca? Kiumaniere vi povas / intencas distribui informilojn por KEA en via komunumo? Ĉu vi pensas ke la estraro de KEA sufiĉe bone kaj ofte komunikas kun vi? Kiumaniere la estraro povas plibonigi la fluon de komunikado? Ĉu vi ŝatas la aspekton de la nova retejo de KEA? Ĉu vi havas ideojn por plibonigo? Ĉu vi scias ke la kreado de ampleksa, moderna, facile uzebla kaj profesia portalo por Esperanto-informado estas vere tre kosta afero?

Finfine, ĉu vi scias ke vi povas donaci al la Kanada Esperanto-socio pere de "United Way"? Via asocio estas 'karitata asocio' en Kanado. Kiam vi faras vian kutiman donacon petu ke oni disdividu porcion por KEA. Uzu nek la anglan nek la francan nomon de KEA ĉar la oficiala karitata nomo de nia asocio estas "La Kanada Esperanto-Asocio." "United Way" transpagas vian donacon rekte al KEA. La registrita karitata numero de KEA estas: 11897 7487 RR 0001. Vi poste ricevas 'oficialan kvitancon por impostaj celoj'.

Vi ankaŭ povas donaci por la laboro de KEA kiam vi remembriĝas per sendo de pli granda monsumo al la kasisto. Nepre menciu ĉu la donaco estas por la ĝenerala kaso, aŭ por depono en la "Kanada Esperanto-Fondaĵo" (KEF).

La kapitalo de la KEF ne povas esti uzita; nur la kresko estas havebla por asocia laboro. La KEF nun troviĝas kiel gastigata fondaĵo ene de la Victoria Foundation. Ĝia kresko varias laŭ la borso sed ĝia elpago estas proksimume 7.5% jare nuntempe. La elpago estas ĉiam sub la nivelo de kresko por ke la kapitalo ĉiam iomete kresku.

Se vi ekplanas heredaĵon por viaj gefiloj aŭ genepoj eble vi ankaŭ deziros heredigi porcion de

via proprietaĵo ankaŭ al KEA kiel lastatempe faris dankinda membro, Margaret Vincent. Ŝi deziris ke eĉ post sia forpaso KEA havu la financajn rimedojn por antaŭenigi Esperanton kiel la solvon por la mondaj lingvaj problemoj. Pro tio ŝi metis kodicilon en sia testamento ke certa procento de ŝia heredaĵo estu transpagita al KEA.

— Wallace G. du Temple

## Elektiĝis nova estraro por Kanada Esperanto-Asocio

[ Laŭ la statuto de la Kanada Esperanto-Asocio, ĉiu kiu deziras esti estrarano de nia asocio devas komuniki sian kandidatecon al la asocia sekretario ĝis la fino de aŭgusto en nepara jaro (2005, 2007, 2009 ktp) por enposteniĝi komence de la sekva jaro. Povas esti dek unu reprezentantoj de la ĝenerala membraro en la estraro; se pli ol dek unu kandidatoj prezentas sin (laste en 1993) la membraro decidas inter ili per referendumo. Alikaze, oni konsideras ĉiujn kandidatoj esti elektitaj. —psh ]

Ĝis la limdato (la 31a de aŭgusto) dek membroj konsentis esti kandidatoj por la nova estraro. Ĉar tio estas malpli ol la dek unu permesata de la statuto, ni ne estas devigataj baloti. Unu kandidato poste retiris sian kandidatecon, do la restantaj naŭ fariĝos estraranoj por la deĵorperiodo 2008/2009 kaj enposteniĝos la unuan de januaro 2008.

Se la membroj ne estas kontentaj pri iu(j) en la listo, memoru ke kvarono (minimume) de la membroj de KEA povas devigi referendumon se ili volas. Espereble tio neniam okazos, sed mi atentigas, ke tiu 'sekureca' rimedo ekzistas.

La anoj de la Estraro de KEA 2008/2009, ordigitaj alfabete kaj kun loĝurbo, estas la jenaj:

1. Yves Bellefeuille: Otavo
2. Edmond Brent: Longeuil (apud Montrealo)
3. Normando Fleury: Montrealo
4. Geoffrey Greatrex: Otavo
5. Benjamin Irwin: Otavo
6. Boris-Antoine Legault: Montrealo
7. Ken Price: Toronto
8. Allan Simon: Kalgario
9. Robert Williamson: Dartmouth (apud Halifakso)

Ken Price, sekretario de KEA

| ☆ | ☆ | ☆ | ☆ | ☆ | ☆ | ☆ | ☆ | ☆ |
|---|---|---|---|---|---|---|---|---|
| **AS** | **KP** | **YB** | **GG** | **BI** | **NF** | **BAL** | **EB** | **BW** |
| Kalgario Alberto | Toronto Ontario | Otavo Ontario | Otavo Ontario | Otavo Ontario | Montrealo Kebekio | Montrealo Kebekio | Longueuil Kebekio | Dartmouth Nov-Skotio |



## Esperanto-agado ĉe la Kebekia Socia Forumo

(el *La Riverego*, n-ro 89, septembro 2007)



Jean-Claude Bélanger (maldekstre) kaj Normand Fleury dum la manifestacio de Socia Forumo

La unua kebekia socia forumo okazis fine de aŭgusto 2007 en la Universitato de Kebekio ĉe Montrealo (UQÀM). La Esperanto-klubo de UQÀM, kunlabore kun ESK, aktive partoprenis dum la tritaga evento. Fakte temis pri granda forumo kun partopreno de plurmiloj da homoj kaj plurcentoj da asocioj plej diversaj el politika, laborista, sindikata, religia, sociekonomia, socia, ekologia (ktp) medioj.

Oni povas paroli pri bunta programo kiam okazas samtempe pli ol 30 programeroj kiel prelegoj, laborgrupoj, diskutrondoj, debatoj kaj tiel plu. Mi gvidis duhoran diskuton pri la temo *Kiu lingvo por la alternativa movado?* kun partopreno de 12 personoj.

Danke al la partopreno de kelkaj Esperanto-UQÀM-anoj estis bonega budo kun temo: *La Esperanto, la alia lingvo*. Mondmapo kun informoj pri malaperintaj lingvoj staris panele apud afiŝoj, kaj ĉe-table estis informoj pri la avantaĝoj de Esperanto kiel egaleca komunikilo por la alisocia movado.

Ni estis du aŭ tri deĵorantoj ĉe la budo kiuj respondis al multaj interesitoj kaj al plej diversaj demandoj pri Esperanto. Mi eĉ diru ke estis facile informi pri Esperanto ĉar homoj kiuj venis al nia budo ofte entuziasme aŭskultis, miris pri la eblecoj de la monda lingvo kaj favoris la ideon de neŭtrala lingvo. Ni nepre devas provi pli ofte ligi la Esperanto-movadon kun la alisocia movado ĉar tiu movado sintene similas al ni.

Dimanĉe okazis manifestacio kaj ni havis grandan banderolon kun la sama slogano *espéranto, l'autre langue* kaj ni disdonis centojn da paperaj slipetoj kun la demando *Kiu lingvo por la alternativa movado?*

Fine mi ŝatus danki al Magnolia, Valérie, Zdravka, Yan, Sylvain, Jérôme-Frédéric, Cora, Edmond kaj aparte speciale al Boris kiuj helpis dum la forumo. Via helpo estis tre grava kaj ni sukcesis bone kaj bele prezenti Esperanton dank' al vi.

— Normand Fleury

### Bryce Waters

Kun granda bedaŭro k malĝojo mi anoncas la trankvilan forpason en majo (2007) de mia kolego, amiko kaj longtempe fidela vankuverano Bryce Waters en Burnaby (BC) en la aĝo de 82 jaroj.

De kelkaj jaroj Bryce pro fizike malbona sanstato ne plu aktivis en niaj kanadaj Esperanto-rondoj, sed en la 60aj, 70aj kaj 80aj jaroj li ofte postenis kiel kasisto kaj sekretario de la vankuvera grupo. Li estis dumviva membro kaj de KEA kaj de UEA.

— Brian D. Kaneen

## W. Dez Hackett

Dimanĉe, la 21an de januaro 2007, mortis en Toronto, pro spira pneŭmonio unu el la pioniroj de la postmilita Esperanto-movado en Kanado. Li estis 88-jara. Postvivas lia edzino Dorothy, kaj du filoj Robert kaj Phillip.

Dez verkis ĉi tiun priskribon de sia vivo, kiu aperis en ***Alumeto***, vintro 1994/95:

> Naskite en Edmontono, Alberto, en 1918 mi transloĝiĝis al Toronto kiam mi havis nur du jarojn. Dum mia gimnazia periodo ofte vizitis mian hejmon juna lerta lingvisto, fakte kuzo nomata Gordon Hallman, kies estonto estis rifuzita al li per ia stranga malsano kiu komenciĝis en la kalkano, supreniris la kruron kaj fine mortigis lin.
>
> Tiu estonto estus por li posteno ĉe Unuiĝintaj Nacioj. Tamen li tiel feliĉe parolis pri la celo de Esperanto kaj pri la gajeco de geesperantistoj, ke, laŭ lia informo, mi sendis 15 cendojn al iu poŝtkesta numero kaj ricevis tre malgrandan gramatikon de J.J. Sussmuth.
>
> Post la ricevo de gimnazia diplomo, mi laboris ses aŭ sep monatojn ĉe ekspresa kompanio (C.P. Express) antaŭ ol aliĝi al la aerarmeo. Post ses monatoj en radaraj kursoj ĉe Montrealo kaj Toronto mi troviĝis en radara taĉmento apud Halifakso, kie mi ankaŭ eldonis anglalingvan interligilon, *Tower Lights*. Post pliaj naŭ monatoj oni sendis min al alia radara taĉmento ĉe la plej norda pinto de Novlando, kie tiam novlandanoj havis propran monsistemon kaj foje fumis usonajn cigaredojn; fakte, Novlando estis <<transmara>>! Tamen, antaŭ ol enŝipiĝi, mi enĵetis mian etan gramatikon en mian ekipaĵon. Ja estis en Novlando kie mi eklernis Esperanton! Mi ankaŭ organizis helpantojn por eldoni kaj redakti alian taĉmentan ĵurnalon, nomatan *Komatick*, la novlanda vorto por <<hunda teamo>>.
>
> Tuj post demobilizo mi reiris al mia kompanio kaj kun nur rudimenta scio pri Esperanto ekserĉis spuron de esperantistoj en Toronto. Fine, mi trovis grupeton ĉe la Germana Klubo sur Church-strato, gvidata de Fred Kaelble, ĉarpentisto kiu jam antaŭ longe ellernis Esperanton per rapida kurso en Freiburg, Germanio. Poste, en alia kunveno ĉe YMCA, dekdu esperantistoj konstatis ke mi povas tajpi ... do, subite, oni elektis min sekretario-kasisto de la Esperanto-Klubo de Toronto! Ne ekzistas pli bona metodo por plibonigi onies uzadon de Esperanto!
>
> La jaro estis 1946 kaj mi entuziasmiĝis pri la plena ebleco de Esperanto; ke ĝi povus solvi la lingvajn problemojn de Kanado; ke kanadanoj povus montri al la mondo la veran valoron de esperanto. Iom post iom mi konvinkiĝis, ke Kanado havu propran Peranton kaj Ĉefdelegiton rilate al la Universala Esperanto-Asocio! Ke tiom da aliaj gesamideanoj havis similajn opiniojn, vere ekscitis min. Mi ankaŭ ekenamiĝis je novalveninta anglino, Doroteo, kaj post du jaroj, mi edziĝis. Ŝi aplaŭdis la ideon de Esperanto sed ne volis ĝin lerni.
>
> Aŭdinte pri la sukcesa tutamerika kongreso de EANA ĉe la King-Edward-Hotelo de Toronto de 1935, kaj sciinte ke la tiama KEA malfondiĝis en 1941 pro la erupto de la dua mondmilito, mi ekscivolis kial usona organizaĵo havu la taskon prizorgi la bezonojn de la kanada esperantistaro. Por pli bone studi la situacion, mi organizis la EANA-n Kongreson ĉe Selby-Hotelo en 1948. Mi vidis la formiĝon de skismo en la usona movado kaj deziris ke Kanado havu sian propran reprezentanton por la Universala Asocio. UEA avide konsentis kaj petis, ke mi estu Ĉef-delegito por Kanado, posteno kiun mi okupis de 1954 ĝis 1984.
>
> Kun la energio de juneco mi feliĉe tiam akceptis la laboron starigi suborganizaĵon: <<La Centro Por Kanadaj Esperantistoj>>, kies duobla cello estis ne nur eltrovi malnovajn Esperantistojn tra Kanado sed ankaŭ krei novajn! La jarkotizo estis 50 cendoj! Por tiu sumeto membroj ricevis mian



> primitivan kvaronjare eldonitan *Bultenon*. Por doni iom pli bonan sencon de tutlanda graveco, mi baldaŭ elektis la nomon <<Lumo>>, historia nomo de la unua kanada Esperanto-periodaĵo en Ste-Hyacinthe, Kebekio. (Post la unua KEA-Kongreso mi feliĉe transdonis la redaktajn kaj presigajn respondecojn al aliaj multe pli kapablaj ol mi. Ni fieru pri la multaj elstaraj redaktoroj de *Lumo* tra la jaroj. Ili ja alportis al la kanada movado bonegan servon kaj honoron.)
>
> Plejparte, malnovajn membrojn ni gajnis pro enketo verkita, presita ka dissendita de Rudi Eichholz. La okcidentaj provincoj eksciis pri Esperanto kiam Frank Hanson, redaktoro de la ĉiusemajna gazeto de la CCF, *Commonwealth* (Regina), konsentis presi serion de dek artikoletoj pri kelkaj aspektoj de Esperanto kiujn mi verkis en 1955.
>
> Preskaŭ samtempe mi ankaŭ verkis <<Dek-lecionan Korespondan Kurson>> kiu allogis kelkajn novajn gesamideanojn al la Movado. Finfine, en la jaro 1959, okazis la Unua Kongreso de la nova Kanada Esperanto-Asocio ĉe la Berkley-Hotelo en Montrealo, dank' al la unua serioza oferto, de Charles R. MacDonald, organizi ĝin.
>
> Tamen, ĉirkaŭ 1961-62 d-ro Richard Horwood provis testi la veran mezuron de niaj komunaj penoj kiam li kontaktis la edukajn ministrojn de ĉiuj provincoj. La peto estis, ke oni konsideru formiĝon de eksperimenta plano pri enkonduko de Esperanto en la edukan sistemon. La respondoj aŭ tute ne ekzistis aŭ estis ĝentile kompromitaj. Eĉ kiam UEA havis Universalan Kongreson en Vankuvero en 1984, al la okazaĵo mankis la necesa potenco por influi la politikajn instancojn de la lando. Pro tio, mi difuzis miajn energiojn en aliaj direktoj. Samtempe, mi scias ke Esperanto povas doni al la socio la plej bonan ŝancon komuniki la magion por trovi la sopiritan solvon. Konvinki la registarojn ... tio estas la problemo.

Dez estis la unua sekretario de la refondita KEA (1958-61 kaj poste 1963-64) kaj ĝia dua vicprezidanto (1962-). Je ĝia ekesto, la 3an de januaro 1958, K.E.A. havis 50 membrojn. Je la komenco de aprilo tiujare la membraro nombris 85.

Dez restis fidela membro de KEA ĝis la fino. Pro liaj grandaj kontribuoj al la movado, en 1994 li estis elektita Honora Membro de la Kanada Esperanto-Asocio.

Dez ŝatis la rakontojn pri "Sherlock Holmes" de Arthur Conan Doyle, kaj li estis membro de la klubo de Holmes-ŝatantoj "La Botfaristoj de Toronto" (The Bootmakers of Toronto), asocio de homoj interesiĝantaj pri Ŝerlok Homz kaj la verkoj de Sir Arthur Conan Doyle. Li mem tradukis unu el ili, "Studo en Skarlato" (A Study in Scarlet). Ĝi aperis en la somera numero 1983 (volumo 6, numero 4, p. 23-25) de *Canadian Holmes*, la revuo de la asocio Bootmakers of Toronto.

Parto de tio estas legebla en la reto ĉe: http://www.geocities.com/Athens/Academy/1475/hackett/
Dez ĉeestis Universalajn Kongresojn de Esperanto en Vieno-1970, Portlando -1972, Brajtono-1989, kaj Vankuvero-1984.

En la interreto, dank' al 'Kanadano' jam troviĝas informo pri Dez ĉe:
< http://eo.wikipedia.org/wiki/W._Desmond_Hackett >

Al lia edzino Dorothy, kaj filoj Robert kaj Phillip, ni sincere kondolencas.

— Ken Price

## KEA donace ricevos bibliotekon

Kun plezuro ni anoncas ke d-ro Stevens Norvell faris grandaniman donacon al KEA, kiu utilos al niaj membroj dum multaj jaroj - espereble 'eterne'!

Steĉjo proponis donaci al KEA la Libraron Ludovikan, kiu konsistas el proksimume 2000 libroj kaj diversaj periodaĵoj, sonbendoj, ktp. Ekzistas katalogo en presita kaj elektronika formatoj,* kiu iom detale priskribas la librojn. Por doni financan rimedon por bona prizorgado de la kolekto, Steĉjo proponis ankaŭ donaci al KEA $10,000, kiu estos specife por tiu celo.

Kompreneble, la estraro dankeme akceptis ĉi tiujn donacojn. Stecjo ankaŭ diris ke li intencas testamenti plian monsumon, kiu estos por la longdaŭra prizorgado kaj plibonigo de la kolekto.

Li skribis: "La Libraro devos resti uzebla por la esperantistoj de Kanado. La celo de la Libraro devos esti instigi kaj faciligi la lernadon kaj studadon de Esperanto, la legadon de libroj kaj alia legmaterialo en Esperanto, kaj la aŭskultadon kaj spektadon de sonbendoj, videodiskoj kaj similaj aferoj de la kanadaj esperantistoj."

Laŭ nuna plano, Reni Porter veturigos la libraron de Halifakso al Montrealo dum la unua duono de 2008, kaj tie ĝin prizorgos la Libroservo de KEA, kiu respondecos pri prizorgado de la libraro kaj aranĝos ke libroj el la kolekto estu pruntepreneblaj de membroj de KEA perpoŝte aŭ alimaniere. Tre raraj libroj, kompreneble, ne estos prunteblaj perpoŝte!

Al Steĉjo Norvell: Grandegan Dankon!

la estraro de Kanada Esperanto-Asocio

* * * * * * * * *

## MeKaRo 5 en Montrealo

(el *La Torontano*, n-ro 79, junio 2007)

La Montrealaj esperantistoj meritas dankon pro la bone organizita turisma renkontiĝo dum la longa semajnfino de la 19a ĝis 21a de majo. Tridek esperantistoj, inter ili kvin torontanoj, partoprenis la kvinan Mez-Kanadan Esperantistan Renkontiĝon.




Kelkaj partoprenintoj de MeKaRo 5, antaŭ la historia „Domo Smith"

La programo komenciĝis sabaton matene, kiam ni renkontiĝis en la malnova kvartalo, kaj dividiĝis en kvin aŭ ses pli malgrandajn grupojn, ĉiu kun loka gvidanto. En tiu kvartalo estas kelkaj el la plej frue konstruitaj turoj de la malnovaj bankoj. Dum la epoko kiam ili konstruiĝis, oni konstruis bele ornamitajn fasadojn, ne la „skatolojn" kiuj estas la nuntempa stilo.

Inter la vizititaj lokoj estis la Domo Sir Wilfrid Laurier kaj la Kastelo Ramesay. Tiu agrabla sunplena tago finiĝs per komuna manĝado en restoracio en la proksima ĉina kvartalo.

* Enkonduko ĉe http://www.genekeyes.com/Enkonduko.html, la katalogo mem ĉe http://genekeyes.com/Katalogo.html






Behrouz prelegas pri persa historio

Dimanĉon je 10h00 atm okazis vizito al la Muzeo de malnova Montrealo kaj poste lunĉo en itala restoracio.

Post la lunĉo ni iris al UQAM (Universitato de Kebekio ĉe Montrealo) por prelegetoj. Ĉiuj estis interesaj, sed mi aparte mencios nur kelkajn. Behrouz, iama montrealano kiu nun estas torontano, informis nin pri persa historio helpate de komputile projekciitaj diagramoj kaj bildoj. Ne nur jam spertaj esperantistoj prelegis. 16-jara Benjameno el Otavo, kiu eklernis Esperanton en julio pasintjare, faris mirinde kompetentan prelegeton, ankaŭ ilustritan per projekciitaj bildoj. Magnolia, kiu lernis en la klaso de Boriso en la universitato dum la pasinta vintro, jam kapablis paroli pri la kongruaj celoj de Esperanto kaj bahaismo.



Normando (dekstre) gvidas dum promenado

Je 18h00 ni promenis al la tre bona vegetara bufeda restoracio Commensal. Mi notis ke la prezoj ŝajnas esti iom malpli ol en la toronta Commensal. Post bonega dumtaga vetero, pluvetis iomete kiam ni piediris de la restoracio al konstruaĵo de la (kanada) Nacia Film-Instituto, kiu bonŝance estis proksima.



Lunde je la 10a matene - la pluvo jam ĉesis, kaj la suno brilis denove – estis rendevuo ĉe Kastora Lago sur la Reĝa Monto - agrabla promenado sur vojo tra arbaro - vizito al Domo Wilson. Wilson dezajnis kelkajn el la plej famaj parkoj en norda Ameriko, inkluzive ĉi tiun sur la Reĝa Monto en Montrealo. Post tempo por rigardi la ekspozicion tie, ni piediris al belega piknikloko ĉe Kastora Lago. Denove multan dankon al la montrealanoj, kiuj multe laboris por fari, kaj alporti, abundajn bonegajn manĝaĵojn.

Tre sukcesa MeKaRo oficiale finiĝis lundon je 14h00, post invito de Skoto renkontiĝi en Toronto dum la Viktoria-taga semajnfino de 2009 por la sesa MeKaRo.


— Ken Price

### Ĉu vi scias ke...

En la Esperanta Vikipedio estas artikoloj pri **ĉiuj naciaj parkoj de Kanado** ?

## NOREK 2007: raportas organizinto

Iam dum la printempo de 2007 ni demandis: "Ĉu iu jam invitis la ĉi-jaran NOREK-on?" La respondo estis nea. Tamen, nia deziro renkonti denove la E-geamikojn estis tiom forta, ke ni decidis: "Do, ĝi okazos denove ĉe ni, en Sidney BC." Tiun decidon influis la fakto, ke en Sidney estis en tiu tempo konstruata supermoderna hotelo, kiu – laŭ la plano – estos malfermita jam en la somero. Estus bone ekzameni, kion ĝi ofertos al kunvenemaj organizaĵoj, ĉu ne? Dum la printempo la lu-prezoj por gastoĉambroj kaj kunvenejo ne estis fiksitaj, kaj sekve eblis negoci la kostojn. La rezulto, kiun atingis Wally du Temple, estis kontentiga, kaj Wally tuj poste kompilis la tekston de la aliĝiloj kaj dissendis ilin. Dum la somero, iom post iom, la kompletigitaj aliĝiloj alvenadis, aŭ per helika aŭ per elektronika poŝto. Tio estas bona, sed: Baldaŭ komencis alvenadi nuligoj de la aliĝiloj. La kialoj por la nuligoj similis unu al la aliaj: Malbona sanstato. Tio gvidis nin al morna konstato: "NOREK 2007 verŝajne estos la lasta, ĉar bedaŭrinde ni ĉiuj maljuniĝas, doloroj suferigas nin kaj elano malaperas."



Wally kaj Olga du Temple jam multfoje organizis NOREK-on por esperantistoj de nord-okcidenta Nordameriko. Dankon!

La tempo pasis kaj la dato de NOREK, la 21-a de septembro, alvenis. Tiun tagon posttagmeze, enirinte la hotelan vestiblon, ni ekvidis amikajn ridetantajn vizaĝojn de la NOREK-anoj, kaj subite ĉio ŝajnis esti pli espera. Je la 7-a horo vespere ni ĉiuj renkontiĝis en speciala hotela apartemento kaj kune ĝuis trihoran babiladon, kantadon en akompano de gitaro, kaj frandadon.

La serioza parto de NOREK okupis la tutan sabaton, la 22-an de septembro. La ĉefa temo de ĝi kongruis kun temo de Unesko por 2007: Polusaj regionoj. Tri programeroj rilatis rekte al tiu temo:

- 48-minuta filmo "Ĉirkaŭpolusaj ursoj" ( Ĝi esperebIe iĝos la unua produkto rezultonta el la kunlaboro de "Karvonen Films" kaj UEA ).
- Jane Sloan kolektis informojn pri serioze planita sed tamen nuligita scienca(?) vojaĝo al la centro de Tero, la "truo" ie en la regiono de Norda Poluso ( vi kredu aŭ ne ).
- Olga du Temple parolis pri faktoj kaj teorioj rilatantaj al la geografiaj kaj magnetaj polusoj.

La aliaj programeroj estis variaj kaj interesaj:

Ralph Gonyea konatigis la aŭskultantojn kun klariono: ĝia historio kaj ĝia nuntempa uzo en armeoj de Usono kaj Kanado, kaj ĝiaj melodioj ludataj ĉiutage en la soldatejoj.

Erna Sheppard, denaska germanino kaj sperta tradukanto el germana lingvo en Esperanton, montris la gravecon de intima kono de la t.n. unua lingvo por perfekta transigo de la "interna ideo" en tradukoj de poemoj kaj kantoj.

Anna Bennett instruis pri uzo de "paca parolo" en konfliktaj situacioj.

Andrew Sly, la novulo inter ni, surprizis ĉiujn. Li lernis Esperanton nur per komputilo.



Nuntempe li estas volontulo en Projekto Gutenbergo, kaj li varbas novajn volontulojn, kiuj pretas dediĉi iom da sia libera tempo por enkomputiligo de Esperantlingvaj tekstoj de libroj. La nuna celo estas envicigo de Esperanto en la aron de la "plej uzataj lingvoj", t.e. lingvoj, en kiuj estas pli ol 50 librotekstoj haveblaj per komputilo.

En aparta ejo okazis samtempe "lingva ateliero": doc. Brian Kaneen gvidis grupon de la NOREK-anoj, kies E-lingva scio estas "meznivela", al pli bona parolkapablo.

La dimanĉa mateno ( la 23-an de septembro ) estis dediĉita al raportoj pri la UK en Jokohamo, pri la oficejo de "Esperanto USA", pri la redaktado de ***Lumo***, pri la E-kluba vivo en Calgary kaj Seattle, pri la stato de KEA kaj pri NOREK 2008. Leland Ross akceptis respondecon pri organizado de ĝi. Jam nun (t.e. komence de oktobro 2007 ) ni scias, ke la plej taŭga loko por ĝi estas la insulo Orcas, en la pitoreska insularo San Juan. Tie fakte estas la "lulilo" de la usona esperantistaro ( oni parolis tie E-lingve jam antaŭ pli ol cent jaroj ).

Kiel kutime ni havis kelkajn aliajn programerojn pretaj, sed pro manko de tempo ni ne prezentis ilin. Eble venontjare!

Antaŭ la tagmezo, brakumante kaj bondezirante, ni adiaŭis ĉiujn.

— Olga du Temple

## NOREK 2007: raportas gasto

Ĉi-jare NordOkcident-Regiona Esperanto-Konferenco revenis al Sidney-by-the-Sea, organizita de la Viktoria Esperanto-Klubo. Ĝi komenciĝis vendrede vespere, la 21-an de septembro, per interkonatiĝa vespero en unu el la gasto-ĉambroj kun bela elrigardo al maro kaj montoj. La ĉambro havis bonan provizon da manĝetaĵoj kaj trinkaĵoj.

Sabate en la kongresa salono Ralph Gonyea, prezidanto de la Viktoria klubo, bonvenigis nin, kaj oficiale malfermis la konferencon, kies temo estis "La Polusaj Regionoj".

Paralele kun la kongresa programo okazis en alia ĉambro ateliero gvidita de Brian Kaneen. Oni povis laŭvole iri tien por ricevi lingvan konsilon, klarigojn, kaj ekzerci paroladon de Esperanto.



Anna Bennett instruas al NOREK-anoj pace paroli

La unua prezento, de Anna Bennett el Boise (Idaho), havis la titolon "Parolu Pace". Anna donis konsilojn pri kiel solvi interhomajn problemojn pace. Unue, objektive priskribu tion kio okazas, sen prijuĝi, morale antaŭjuĝi, interpreti aŭ diagnozi. Tiam diru kian senton tio kaŭzas ĉe vi - ekzemple: malkomforton, ĉagrenon, embarason, frustron, honton, ŝokon. Post tio, diru kion vi bezonas, ekzemple: dormon, fidon, klarecon, kunlaboron, atenton, egalecon, respekton. Fine, petu (NE Postulu) precize iun facilan tuj plenumeblan agon kiu ebligos tion kion vi bezonas, sed memoru ke la respondo rajtas esti "ne!".



Ralph Gonyea ludas klarionon

Je la 10-a horo Jane Sloan parolis pri "Vojaĝo Sub la Norda Poluso". Post kafpaŭzo Ralph Gonyea prelegis pri "La Historio de la Klariono". Ralph instruas al kanadaj soldatoj kiel ludi la klarionon, kaj 'ilustris' sian prezenton ludante ĉiujn konatajn klarion-vokojn de la kanada armeo. Li rakontis pri la kutima rakonto de la deveno de la usona TAPS, kaj pri ĝia vera deveno. Mi iom timis ke la laŭta klariona ludado ĝenos aliajn gastojn de nia kongresejo, la nova hotelo 'Sydney Pier'. Poste mi demandis al deĵoranto en la akceptejo, kaj li diris ke oni aŭdis nenion ekster la ĉambro. "Estas 14 coloj da betono ĉirkaŭ ĝi," li klarigis.

Sekvis pliaj interesaj prezentoj: Olga DuTemple demandis "Ĉu la Polusoj Migras?" (la respondo estas ke jes, ili moviĝas), kaj post libera tempo por lunĉi, Erna Sheppard parolis pri tradukado de kantoj kaj kantis siajn proponojn por pli bonaj versioj de kelkaj jam tradukitaj kantoj.

Andrew Sly el Viktorio klarigis la celon de Projekto Gutenbergo kaj instigis esperantistojn kontribui al ĝi esperantajn tradukojn de bonaj literaturaj verkoj kies kopirajtoj jam eksvalidiĝis.



Komuna vespermanĝo okazis en la ĉina restoracio "Maple Palace", kaj poste estis filmoj kaj kantoj en la kongresa salono.

Dimanĉe ni iomete diskutis pri la Kanada Esperanto-Asocio, UEA kaj la Universala Kongreso, la kongresa temo, kaj la loko de la venontjara NOREK. Oni esploros la eblecon okazigi ĝin sur insulo en Vaŝingtonio, facile atingebla per pramŝipo el Viktorio/Sidney kaj Anacortes.

— Ken Price

## La retejo de Esperanto en Kanado havas novan vizaĝon

En junio de 2007 finfine publikiĝis nova versio de retejo pri Esperanto en Kanado dank' al la diligenta laboro de Boris-Antoine Legault, prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia kaj baldaŭ ankaŭ estrarano de Kanada Esperanto-Asocio. Certe iom post iom ekaperos pliaj eroj, sed esperanto.ca jam ebligas orientiĝon tra la kanada Esperanto-movado. Estas kelkaj interagaj sekcioj: diskutejo kaj blogejo (nuntempe nur en la Esperanta versio). Eblas ankaŭ aldoni eventojn al la kalendaro, kaj novaĵojn al la ĉefa paĝo. Ĉiu deziranta kontribui povas, post registriĝo ( ĉe la paĝo http://www.esperanto.ca/eo/user/register ), ensaluti kaj aldoni komentojn en forumoj, do ni invitas viziti la retejon, ensaluti, kaj kontribui al ĝia enhavo. La plena adreso estas: **http://www.esperanto.ca/eo**



## Albert Saint-Martin (1865-1947)

Esperantisto kaj socialista militanto

Saint-Martin kunfondis Laboristan Universitaton en 1925, sed faŝisto detruis en 1935 la arkivojn. Laŭ dokumentoj en Internacia Esperanto-Muzeo (Vieno) li estis membro de Lingva Komitato, kaj ĉeestis la Unuan Kongreson de Esperanto.

Albert Saint-Martin estis unu el la plej aktivaj esperantaj batalantoj en Montrealo inter 1902 kaj 1947. Li prelegis, batalis por la lingvo de la komenco de la jarcento ĝis sia morto. Inter 1902 kaj 1904, li verkis multe kun Pierre Beauchemin† en *La Lumo*‡ sub la nomo A. Rembert.

Claude Larivière verkis la unusolan libron pri Albert Saint-Martin.§ Laŭ tiu libro Albert Frédéric Rambert nomita Saint-Martin naskiĝis la 1-an de oktobro 1865 en la montreala laborista kvartalo, Hoshalago. Lia patro estis Joseph Rambert, ĉarpentisto, kaj lia patrino nomiĝis Ursula Sara Jacques; Albert laŭdire havis du fratojn kaj kvar fratinojn. Li edziĝis en 1886 kun Emma Marie Dufresne (1863-1934) de kiu li disiĝis eble inter 1915 kaj 1916. Naskiĝis el tiu geedzeco du infanoj: la filo Théode (1888-1952) kaj la filino Berthe (1891-1980). Tiuj ludis rolon en la movado: Théode sekretariis en la Klubo PROGRESO** kaj Berthe lernis Esperanton frue kaj estis la juna knabino kiu portas lampon disradiantan la mesaĝon "Pri, per, pro, por Esperanto" sur la kovrilo de la revuo *La Lumo*.

Saint-Martin profesiis kiel stenografo en la Supera Kortumo la ĉefan parton de sia vivo. Liaj socialistaj agadoj kaj bataloj malutilis al la familia vivo kiam ili kaŭzis al li longdaŭrajn vundojn. Cetere li forlasis la kristanismon ĉirkaŭ 1895, kio estis tre grava afero en la tiutempe katolikega Kebekio.

Eble estis la stenografo Pierre Beauchemin (1869-1952) kiu enkondukis Saint-Martin al la internacia lingvo. Ŝajnas ke li lernis rapide ĉar li instruis frue esperanton ĉefe en Montrealo kaj Maskuto (St-Hyacinthe) kie li prelegis multfoje. Larivière skribis: "Esperanto estis lingvo jam

---

† Pierre Beauchemin (1860-1952), stenografo, lernis Esperanton de la pastro Solis kun kiu li korespondis; laŭ la usona historiisto Bill Maxey li intencis ĉeesti, en 1908, la nordamerikan Universalan Kongreson sed ne povis pro malsano. Li estis unu el plej aktivaj esperantistoj en Kebekio kaj Nordameriko. La kebekia historiisto Roger Le Moine en sia libro *Deux loges montréalaises du Grand Orient de France* (Otavo, 1991) notis ke Beauchemin estis framasono inter 1902 kaj 1924 (li eksiĝis de la loĝo Emancipation en 1910 pro proceso kontraŭ framasonoj) kun unu alia esperantisto kaj pentristo Ludger Larose (1868-1915). Ŝajnas ke almenaŭ 15 framasonoj apogis aktive la esperantistan movadon en Montrealo je la komenco de la jarcento.

‡ *La Lumo* estis la revuo de la kebekia esperantista movado en la komenco de la jarcento, precize inter 1902 kaj 1904, kaj post 1960 ĝi estis revuo de la kanada esperantista movado. La administrantoj de tiu revuo plektis unu grandan reton en la mondo; ĉirkau 1710 legantoj en 1902 kaj 1730 en 1903 ricevis *La Lumo*-n, el kiuj Théo Cart, Carlo Bourlet, Emile Boirac, Gaston Moch, Louis de Beaufront, Charles Lemaire, Hector Hodler kaj L.L. Zamenhof. En la novembra numero de 1902, ni ekscias ke la montrealaj esperantistaj sendis al L.L. Zamenhof fonografon por koni la veran prononcon ĉar ili lernis esperanton per libroj. Tial, oni eksciis ke pastro Solis renkontis Maskuto-n, ruson kiu vizitis lin kaj kun kiu li parolis la lingvon la unuan fojon.

§ Larivière, Claude, *Albert Saint-Martin, militant d'avant-garde (1865-1947)*, Editions coopératives Albert-Saint-Martin, Montrealo, 1979.

** La Klubo Progreso kaj la Virina Klubo Progreso estis fonditaj en 1902.

tre disvastigita en la laboristaj rondoj ĉar ĝi permesis al laboristoj komuniki trans la lingvaj kaj naciaj limoj."[††] Dum liaj esperantaj agadoj, Saint-Martin estis sekretario en la Laborista Partio kiu estis fondita en 1904-1905, kaj li kandidatis en balotado de 1905 kontraŭ la kebekia ĉefministro, Lomer Gouin (1861-1929) - li ricevis 13% de la voĉoj.

En 1905, li foriris al Europo kun sia familio kaj Pierre Beauchemin por ĉeesti la Unuan Universalan Kongreson de Esperanto en Boulogne-sur-Mer. Plie, oni nomis lin kaj Beauchemin membroj en la Lingva Komitato[‡‡].

Larivière menciis ke Saint-Martin paroladis Esperante, france kaj angle dum unu socialista kunveno en 1906; samjare, ŝajnas ke li faris Esperantan diskon.

En 1907 li kunfondis la Esperantan Kooperativon por helpi la malriĉajn laboristojn kaj la senlaborulojn. Dumtempe li aliĝis al la Socialista Partio de kiu li fariĝis la estro en 1914.

Saint-Martin kun kelkaj amikoj aĉetis, en 1910, bienon apud Mont-Laurier (norde de Montrealo) por fondi kolektivan farmejon kiun ili nomis LA KANADO. Oni ne scias ĉu estis Esperantaj agadoj tie; incendio okazis, kaj la konstruaĵoj estis detruitaj en 1918. Tiujare, kiel multaj laboristoj kaj tutmondaj socialistaj batalantoj, Saint-Martin apogis la sovetan revolucion, kaj li pensis poste ke tiu ĉi devis radikaliĝi sub Trotski. Necesas scii ke la kebekia socio en tiu tempo estis tre konservema kaj netolerema, ĉar la Katolika Eklezio premegis kontraŭ la intelektaj grupoj.

Oni ignoris Albert-Saint-Martin dum multaj jaroj post lia morto, kiu alvenis la 9-an de februaro 1947 kaj tial, ke li estis ateisto, oni entombigis lin en la protestanta tombejo Hawthorne-Dale (oriente de Montrealo) sub granda kverko apud belaj aceroj.

— Max Nadal

(korektado de Edmund Brent kaj Silvano Auclair)

Adaptita al 'Zamenhofa Esperanto' por *Lumo*, de teksto en la retpaĝo:
http://www.er.uqam.ca/nobel/k33440/premier.html#Albert%20Saint-Martin%20(1865-1947)

- - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - - -

## Pontoj

(el *Inter Ni*, n-ro 237, januaro 2006)

Halifakso estas provinca ĉefurbo kun granda atlantika haveno kaj du pontoj, kiuj ligas la malnovan halifaksan flankon kun la malnova apuda urbo de Dartmoŭto, jam delonge parto de la metropola regiono de Halifakso dank' al la pontoj. Ambaŭ estas pendopontoj. La unuan oni malfermis la 2-an de aprilo 1955 post tri-jara konstruo, kaj la duan (la "novan") oni konstruis antaŭ 35 jaroj kaj malfermis la 10-an de julio 1970. La dua estas pli granda kaj pli larĝa ol la unua; ĝi havas kvar vojojn, du por ĉiu direkto. Jam antaŭ kelkaj jaroj oni renovigis la "malnovan" ponton; oni kreis tri vojojn el du, kaj pendis vojetojn el la eksteraj flankoj de la ponto, unu por piedirantoj kaj la alia por biciklistoj. Tiun rekonstruon oni finis en 1999. Oni ne rajtas piediri aŭ bicikli sur la pli nova ponto.

†† Larivière... pĝ. 32

‡‡ Privat, Edmond, *Historio de la lingvo esperanto, La movado 1900-1927*, Internacia Esperanto-Instituto, Hago, Nederlando, 1927, pĝ. 32-34.





Oni devas agnoski la gravecon de ambaŭ pontoj por ebligi pli facilan aliron por halifaksanoj al ambaŭ flankoj de la haveno. Facila interŝanĝo de trafiko ne eblus sen ili, kaj ankaŭ facila, moderna vivo. Antaŭ ol oni konstruis la pontojn, la vivnivelo estis malpli rapida, malpli evoluinta, kaj oni devis fidi al pramboatoj por transiri la havenon. Pro urĝa bezono por pli facila komerco inter la urboj, oni finfine konstruis la unuan ponton, nomitan la ponto Macdonald. Post 15 jaroj multege helpis la dua, kiun oni nomis la ponto MacKay. Nuntempe, oni ne povas imagi la urbon sen la pontoj. Dum la jaro 2004, veturiloj trapasis la du pontojn proksimume 31,7 milionfoje. La 23-an de novembro 2005 oni festis la miliardan transveturon de la pontoj kiam oni donacis premion al paro, kiu veturis al Halifakso en sia aŭto trans la "nova" ponto.

Dum la pasinta somero oni festis la 50-jariĝon de la unua ponto kun ceremonio kaj oportuno por libere promeni la 1,3 kilometrojn de la vojo kie kutime cirkulas la trafiko. Dum la pasinta monato oni ankaŭ festis la laboristojn, kiuj konstruis la du pontojn. La 5-an de decembro 2005, oni malvualis statuon "La fer-laboristo" (farita el kupro de la artisto Peter Bustin) starantan sur dekliva fera trabo. La statuo situas ĉe la dartmoŭta flanko de la malnova ponto, kaj ĉiutage mi povas vidi ĝin kiam mi transiras tiun ponton. Mi kaj mia edzino loĝas transe de la haveno de la malnova ĉefurbo, kie ni ambaŭ laboras. Sen la pontoj, niaj vojaĝoj al la laborejoj estus proksimume 19 kilometrojn pli longaj pro la fakto ke granda baseno troviĝas ĉe la fino de la haveno.

Mi metafore demandas al mi, ĉu oni finfine sentos la neceson por uzi nian karan pont-lingvon por pli faciligi la internacian vivadon? Nia lingva ponto traktas ambaŭ flankojn de lingva aparteco plej egale. Kiel pontoj trans la haveno, ĉiuj vojoj kondukas egale larĝe de unu flanko ĝis la alia. Ĉiu uzanto pagas la saman prezon. Sed nacia pontlingvo malsamas. Ĝi estas libere alirebla al la denaskuloj, sed kondukas al malpli granda grupo da kleruloj ĉe la alia flanko, kiuj ne havas la saman alireblecon. Alivorte, la kosto por uzi la nacian pont-lingvon ne estas egala al ĉiuj. La denaskaj parolantoj pagas preskaŭ nenion, sed la alilingvanoj pagas pli altan koston, ofte tro altan por povi elteni la elspezon.

Efektive, ponto por kunligi la diversajn flankojn de iu ajn lingva aparteco jam ekzistas. Oni jam delonge finkonstruis ĝin - nun oni ja devas nur elekti uzi ĝin.

— Bob Williamson

## Kie vivas Avo Frosto ?

Nu, facilas respondi al tio: kompreneble en Kanado, ĉar la norda poluso troviĝas en Kanado. Mi rakontu al vi, kio okazas al la leteroj kiam la infanoj de la mondo skribas al Avo Frosto.

Antaŭ 33 jaroj, tri deĵorantoj en la komunikada departamento de la Kanada Poŝta Servo malgajiĝis vidante ke la leteroj senditaj al Avo Frosto simple amasiĝas vane, ĉar Avo Frosto ne havis veran adreson. Oni simple detruis ilin, ĉar oni ne sciis al kiu sendi ilin. En 1974, tiuj tri deĵorantoj decidis respondi al la leteroj por pravigi la magion de la jarfinaj festoj. La sekvan jaron, pli da leteroj alvenis tiel ke la triopo petis helpon de pliaj kolegoj por respondi al la

leteroj.

La tuto kreskis rapide kiel neĝpilko kiu ruliĝas laŭ deklivo! Do, post kelkaj jaroj estis centoj da oficistoj de la Kanada Poŝta Servo kiuj kunlaboris kaj en 1983, la Poŝta Servo oficialigis la servon tutlande kun oficiala adreso kaj poŝta kodo. En tiu ĉi jaro, alvenadis 290 000 leteroj.

Ĉirkaŭ 11 000 oficistoj helpis en 2006 dum la tagmeza paŭzo aŭ restis por la laboro por respondi al pli ol miliono da leteroj (1 063 187). En Kebekio, estas pli ol 2 mil koboldaj oficistoj kiuj respondis al 260 000 leteroj. La helpantoj de Avo Frosto respondas ankaŭ rete al la infanoj kiuj skribas uzante komputilon, pli ol 40 mil retleteroj dum pasinta jaro.

Necesas aldoni ke estas tre grave skribi resendan adreson ĉar bedaŭrinde pro sia aĝo, Avo Frosto ne ĉiam memoras la adreson de ĉiuj infanoj en la mondo.

La magio de Kristnasko agas tiel ke la leteroj nun alvenas el la tuta mondo kaj en plej diversaj lingvoj. Fakte, estas nekredebla fenomeno ĉar la Kanada Poŝta Servo ne reklamas tion ekster-kanade.

Se vi interesiĝas scii kion la infanoj petas, nu, kompreneble ludojn kaj ludilojn; kaj ili kompreneble diras ke ili bone agis dum la jaro kaj malofte kverelis kun la gefratoj kaj atentis la gepatrojn. Multaj infanoj mencias ke ili ordigas sian liton matene kaj lavas siajn dentojn vespere. Ili kompreneble atentigas Avon Froston kiam ili translokiĝis al nova domo por ke Avo Frosto ne erare portu iliajn donacojn al aliaj infanoj. Ankaŭ estas demandoj al la maljunulo kiel: Kiom vi aĝas? Kiel vi sukcesas iri tra la fumtubo? Kiom peza vi estas? Kion vi faras somere? kaj multe pli.

La Kanada Poŝta Servo konsideras ke tiu servo estas eduka por la infanoj. Ili lernas skribi sian unuan leteron, afranki ĝin kaj atendi la respondon. Kelkaj infanoj estas tiom ekscititaj ke ili ĉiutage atendas la alvenon de la poŝtisto senpacience.

Ekzistas du diversaj versioj de la leteroj kaj oni provas sendi malsamajn leterojn kiam oni rimarkas ke samfamiliaj infanoj skribis samtempe. Estas ankaŭ post-jarfina versio por respondi al la leteroj kiuj alvenis tro malfrue.

Oni ĉiam provas respondi en la devena lingvo, kaj en 2007 estas pretaj versioj en 26 lingvoj kiel la angla, franca, hispana, portugala, itala, inuka, germana, japana, rusa, rumana, hungara, greka, ĉeka, vjetnama, litova, ukraina, araba, ĉina, armena kaj esperanta. Eblas respondi brajle kaj en aliaj lingvoj laŭnecese. Do, en 2002 Avo Frosto lernis Esperanton.

Se ankaŭ vi ŝatus testi la Esperantan scipovon de Avo Frosto, aŭ se vi konas infanojn kiuj scipovas skribi Esperante, ne hezitu skribi al :

**Avo Frosto**
Norda Poluso
Kanado / Canada
H0H 0H0

Noto: Laŭ niaj statistikoj, Avo Frosto manĝas 2 milionojn da spicaj kuketoj jare !

Raportas post intervjuo kun kobolda estrino de la servo kaj vizito al la laborejo de Avo Frosto Normand Fleury (Montrealo)



## Kiu posedas la zebron?

*La solvo aperos en la venonta numero. Se vi solvas la enigmon, bv. skribu al allansimon@hotmail.com -- la unua solvinto ricevos senpagan unujaran abonon al Lumo.*

En Esperantujo troviĝas sur unu strato kvin domoj, en vico. La enloĝantoj estas bonaj geamikoj, kvankam ili ĉiuj enloĝas malsamkolorajn domojn, kaj havas malsamajn civitanecojn, ŝatas malsamajn trinkaĵojn, posedas malsamajn dombestojn kaj legas malsamajn revuojn.

1. La kanadano loĝas en la ruĝa domo.
2. La italo loĝas apud (najbare al) la blua domo.
3. En la verda domo oni trinkas kafon.
4. La ruso trinkas teon.
5. La verda domo troviĝas najbare kaj dekstre (vidite de vi) de la blanka domo.
6. La leganto de *Literatura Foiro* posedas mefiton.
7. En la flava domo oni legas la revuon *Esperanto*.
8. En la meza domo oni trinkas lakton.
9. La italo loĝas en la plej maldekstra domo.
10. La leganto de la revuo *Monato* estas la najbaro de la posedanto de la kato.
11. La leganto de la revuo *Esperanto* estas la najbaro de la posedanto de la ĉevalo.
12. La leganto de *Kontakto* trinkas vinon.
13. La ĉino legas kompreneble la revuon *El Popola Ĉinio* !
14. La kubano posedas hundon.

**Do, kiu trinkas akvon? Kaj kiu posedas la zebron?**

## Deziras korespondi

Se vi interesiĝas pri korespondado kun japanoj, bonvolu turni vin al :

**Koresponda Servo de Japana Esperanto-Instituto**
**Sinzyuku-ku, Waseda-mati 12-3**
**Tokio, Japanio**

Skribante al ni korespond-peton, bonvolu aldoni vian aĝon, sekson, profesion, interesojn, kaj viajn preferojn por faciligi nian laboron.

— N. Sakurai por Japana Esperanto-Instituto


## Ĉu vi scias ke…

- En la Esperanta Vikipedio estas artikoloj pri ĉiuj provincoj kaj teritorioj de Kanado ?
- En la Esperanta Vikipedio estas artikoloj pri 23 urboj de Brita Kolumbio, 21 urboj kaj urbetoj de Alberto, 10 urboj de Saskaĉevano, 4 urboj de Manitobo, 26 urboj de Ontario, 8 urboj de Kebekio, 3 de Nov-Brunsviko, 2 de Nov-Skotio, kaj po 1 de Insulo de Princo Eduardo, Novlando kaj Labradoro, Jukonio, Nordokcidentaj Teritorioj kaj Nunavuto? (vidu **http://eo.wikipedia.org/wiki/Listo_de_urboj_de_Kanado**)

## Demian. La historio de la junaĝo de Emil Sinkler

verkis **Hermann Hesse. Tradukis: Detlef Karthaus.**

New York: Mondial, 2007; **ISBN:** 9781595690661.




En la jaro 1919, la germana-svisa verkisto kaj posta nobelpremiito Hermann Hesse (1877 – 1962) publikigis sian parte aŭtobiografian romanon *Demian* sub la pseŭdonimo Emil Sinclair (Sinkler). Ĝi estas romano pri la ofte komplika vojo de junuloj al sintrovo aŭ memrekono, antaŭ ĉio de tiuj junuloj kiuj, kiel Hesse mem, kiel adoleskuloj sentis sin pli solulo j ol partoj de grupoj de samaĝuloj.

Hesse tenas la lingvaĵon kaj la agad-strukturon de la romano tre simplaj, ne nur por rekte komprenigi sin al junuloj, sed precipe por fokusigi la atenton de la legantoj al la interna evoluo de la ĉefa heroo. Hesse estis tiam adepto de psikanalizo, kaj la romano povas esti komprenata kiel studo de la evoluo de juna homo el la vidpunkto de psikanalizo.

Samtempe, Hermann Hesse enplektis en la historion de Sinkler multon el sia propra junaĝo: sian rilaton al sia familio, siajn deprimojn, siajn misvojojn, la serĉon de amo kaj vera amikeco, kaj sian fojan samseks-erotikan rilaton. La figuro de Demian, gvidanto kaj savanto de Sinkler en la romano, estas rigardata kaj kiel amiko de Sinkler, kaj kiel personigita parto de Sinkler mem. La Kain-signo, kiun, en la romano, homoj rekonintaj sin mem, portas sur sia frunto, kaj la societo de tiuj portantoj de la Kain-signo, rilatas al la Societo de Monte Verità en Svislando, al kiu Hesse apartenis, kaj kiu en la komenco de la 20-a jarcento estis komunumo de artistoj kaj elirpunkto de pluraj modernaj kaj alternativaj movadoj.

Kun *Steppenwolf (Stepolupo)*, *Siddharta (Sidharto)* kaj *Das Glasperlenspiel (La Ludo de Vitraj Perloj)*, *Demian* apartenas al la ĉefaj verkoj de Hesse kaj siatempe rapide fariĝis sukcesa kultlibro por adoleskaj homoj.

Ĉi tiu libro, tradukita de la kanada esperantisto Detlef Karthaus per multjara laboro, estas rete aĉetebla rekte de la eldonisto, de konataj retaj librovendistoj kiel amazon.ca, aŭ de via preferata librovendejo : ligiloj al diversaj vendistoj troveblas rete ĉe la adreso :

**http://www.librejo.com/libroj/beletro/tradukita/prozo/hermann-hesse-demian.html**

## Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2007

(el *Gazetaraj Komunikoj de UEA*, n-ro 265, de 2007-08-10)

**Poezio**
Unua premio: Anja Karkiainen (Finnlando) pro "En ambaŭ";
Dua premio: Michael Cayley (Britio) pro "Memoroj";
Tria premio: ne aljuĝita.

Partoprenis 30 verkoj de 16 aŭtoroj el 13 landoj.

**Prozo**
Unua premio: Tim Westover (Usono) pro "Ruĝvela ŝipo";
Dua premio: Lena Karpunina (Rusio) pro "La botoj";
Tria premio: Sten Johansson (Svedio) pro "Frotvundo".



Partoprenis 24 verkoj de 13 aŭtoroj el 11 landoj.

**Eseo**
Unua premio: Geoffrey Sutton (Britio) pro "Pri la periodoj de la Esperanto-literaturo";
Dua premio: Paulo S. Viana (Brazilo) pro "Psiko-memhelpa literaturo: utila? senutila? malutila?";
Tria premio: Tonyo del Barrio (Hispanio) pro "La normala lingvo".

Partoprenis 8 verkoj de 6 aŭtoroj el 5 landoj.

**Teatro**
Unua premio: ne aljuĝita;
Dua premio: Brian E. Drake (Usono) pro "Koroj en mallumo";
Tria premio: ne aljuĝita;
Honora mencio: Stefan MacGill (Hungario) pro "La aŭto-mato".

Partoprenis 2 verkoj de 2 aŭtoroj el 2 landoj.

**Infanlibro de la Jaro**
Eldonejo "Éditions Pour penser à l'endroit" pro la libro *Ĉio fareblas* de Aline de Pétigny", tradukita de Martine kaj Christian Rivière.

Partoprenis 5 verkoj el 5 landoj.

**Kanto**
Unua, dua, tria premioj: ne aljuĝitaj;
Honora mencio: Dina Lukjanec (Kazaĥio) pro "La urbo ora".

Partoprenis 8 verkoj de 4 aŭtoroj el 4 landoj.

**Babilejo de l' redaktoro**



Pasis naŭ monatoj depost kiam laste aperis numero de *Lumo*, sed finfine vi havas en viaj manoj novan numeron, la unua por 2007. Baldaŭ ekdeĵoros nova estraro de Kanada Esperanto-Asocio, kaj eble ĝi faros decidon kiu ebligos baldaŭan aperon de la dua ĉi-jara numero. Intertempe, mi daŭre laboros je pliaj numeroj de ĉi tiu revuo sed, kiel scias tiuj kiuj emas foliumi en la Esperanta Vikipedio, mi ankaŭ multe verkas, tradukas, kaj adaptas materialojn por tiu ĉi nia plej vasta kompendio de scioj en Esperanta lingvo, kio ne ĉiam akordiĝas kun regula redaktado de lingve kaj grafike altkvalita *Lumo*. Eble la revuo povus aperi pli ofte, se mi rezignus pri interesa enhavo, bona grafika aspekto kaj zorge kontrolita lingvaĵo... sed kiel dumviva membro de Kanada Esperanto-Asocio mi hontus tiel prezenti nian asocion. Kion opinias vi pri tio ?

Bv. sendi kontribuaĵojn por la sekva numero al : **Paul Hopkins < hoppaul@gmail.com >**
**#55 - 9520 Bonaventure Drive SE, Calgary, AB T2J 0E5**

## Kalendaro

### Regulaj kunvenoj:

**Halifakso** (Nov-Skotio): Oni kunvenas proksimume dufoje ĉiun monaton ĉe la hejmoj de grupanoj. Pliaj informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/halifax**

**Kalgario** (Alberto): la Kalgaria Esperanto-Rondo kunvenas ĉiun lundan vesperon inter la 19h00 kaj 21h00 ĉe la kafejo Second Cup en distrikto Kensington (338 – 10a Strato NOk). Pliaj informoj ĉe **http://esperantocalgary.blogspot.com/**

**Montrealo** (Kebekio): la lastan vendredon de ĉiu monato (krom decembro) okazas Amika Vespero de ESK en MEDO (Montreala Esperanta Domo, 6358-A Bordeaux). La tempo inter 19h00 kaj 20h00 estas rezervita por komencantoj kaj de 20h00 ĝis 22h00 por diskutado. Pliaj informoj ĉe **http://www.esperanto.qc.ca/eo/activites**

**Toronto** (Ontario): Oni kunvenas ĉiun lundan vesperon ĉe kafejo Timothy's World Coffee ĉe stratoj College kaj Bay inter la 18h00 kaj 20h00. (Escepto: kiam lundo estas feritago la kunveno okazas mardon.) Pliaj informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/toronto**

**Viktorio** (Brita Kolumbio): Kunvenoj okazas en North Saanich ĉiun lundon de la 12h00 ĝis 14h00 en la domo de Olga kaj Wally du Temple kaj ĉiun ĵaŭdon de 13h00 ĝis 15h00 ĉe Golfludejo Ardmore. Pliaj informoj ĉe **http://esperanto.ca/victoria/**

### Laŭokazaj kunvenoj:

**6-a de decembro (ĵaŭdo)**

**Otavo** (Ontario): Babil-kunveno ĉe kafejo Bridgehead (108 avenuo Third) ekde 19h15.

**15-a de decembro (sabato)**

**Kalgario** (Alberto): Zamenhofa festo, ĉe familio Hopkins, 14h00 ĝis 16h00. Pliaj informoj ĉe la blogo (vidu supre)

**Montrealo** (Kebekio): Zamenhofa festo, en restoracio Le Commensal (1720 strato St-Denis) en la suba etaĝo. Pliaj informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/node/214**

**Otavo** (Ontario): Zamenhof-festo, loko anoncota, 19h15 ĝis 21h15. Pliaj informoj ĉe **http://www.esperanto.ca/eo/node/186**

**16-a de decembro (dimanĉo)**

**Toronto** (Ontario): Zamenhofa festo, en la festoĉambro de 77 Carleton de 14h00 ĝis 20h00.

**12-a ĝis 18-a de julio 2007**

**Montrealo** (Kebekio) : 7a Tut-Amerika Kongreso de Esperanto kun jar-kunveno de Kanada Esperanto-Asocio kaj la 56-a Nacia Kongreso de ELNA (Esperanto USA). Informoj en Esperanto ĉe **http://www.take7.ca/enkonduko-eo.html**

**19-a ĝis 26-a de julio**

**Roterdamo** (Nederlando) : 93a Universala Kongreso de Esperanto. Pliaj informoj ĉe **http://www.uea.org/kongresoj/uk_2008.html**

**26-a de julio ĝis 2-a de aŭgusto**

**Szombathely** (Hungario) : Internacia Junulara Kongreso (de TEJO). Pliaj informoj ĉe **http://esperanto.net/ijk2008/**